



KULTURA KAJERO *de la* ***Asocio Amikoj de CDELI***

Januaro 2017

El prelegoj okazintaj en 2016:
la 5-an de marto, dum *Asembleo*,
kaj la 19-an de aŭgusto,
kadre de *Kultura vespero*.

En CDELI, 2016.08.18: Stefano KELLER, Bernhard TUIDER, Jacques-André HUMAIR



Klarigoj pri la foto aliflanke de la paĝo



Claude GACOND



Nicole MARGOT

Kovrilpaĝe

Dum la semajno 15-19 aŭgusto 2016 vizitis CDELI-n Bernhard TUIDER, gvidanto de la bibliotekista teamo en la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko en Vieno. Li esploralaboris en nia arkivejo, kies havaĵo konsistigas la pretigatan Bibliografion de Esperanto kaj Interlingvistiko. Konklude de lia restado en La Chaux-de-Fonds, kadre de kultura vespero la 19an de aŭgusto, Bernhard TUIDER prelegis pri la temo: «Kolekto por Planlingvoj de la Esperantomuzeo, historio kaj evoluo, havaĵo, celoj kaj nunaj projektoj». La teksto kaj bildoj de lia prezentaĵo troviĝas en tiu ĉi publikaĵo.

La kovrilpaĝe videbla foto memorigas pri lia renkonto, la 18-an de aŭgusto, kun Jacques-André HUMAIR, direktoro de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds. La renkonto konkludiĝis per vizito en la CDELI-laborsalono, sub gvido de Claude GACOND (la fotinto). Sur la foto: Stefano KELLER (CDELI), Bernhard TUIDER (Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo, Vieno), Jacques-André HUMAIR, (Bibliothèque de la Ville, La Chaux-de-Fonds).

Enhavo:

Bernhard TUIDER:

*Kolekto por Planlingvoj de la Esperantomuzeo, historio kaj evoluo,
havaĵo, celoj kaj nunaj projektoj
paĝoj 1 - 10*

Claude GACOND:

*Ĉu esperanto progresis?
paĝoj 11 - 16*

Nicole MARGOT:

*Pri Etnismo kaj etnaj liberecoj
paĝoj 16 - 20*

KULTURA KAJERO de la Asocio Amikoj de CDELI

Redaktoroj: Claude Gacond kaj Stefano Keller

Eldonanto: Asocio Amikoj de CDELI,

Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI),

Biblioteko de la Urbo, Strato Progrès 33, Poŝtfako 3034,

CH-2303 La Chaux-de-Fonds (NE), Svislando. Telefono: +41 32 967 68 42

Januaro 2016

Bernhard TUIDER:
*La Kolekto por Planlingvoj kaj la
Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko.
Historio, havaĵoj kaj projektoj*



Fondita en 1927 kiel privata asocio la Internacia Esperantomuzeo estas ekde 1928 parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Atentigante, ke ĝi ne nur kolektas, konservas kaj disponigas literaturon en kaj pri Esperanto, sed ĝenerale materialon en kaj pri planlingvoj, la nomo ŝanĝiĝis en 1990 al “Kolekto por Planlingvoj kaj Internacia Esperantomuzeo”, ekde la jaro 2005 la oficiala nomo estas “Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko”.

1. Historio

1.1 Fondo

La Esperantomuzeo estis fondita en 1927 de Hugo Steiner (1878-1969), pensiiginta fervojisto, kiu eklernis Esperanton jam en 1911. Laŭ Steiner la ideo por la fondo de la muzeo venis de Felikso Zamenhof (1868-1933), kiu esprimis en 1927 dum la 19-a Universala Kongreso de Esperanto en Gdańsk la penson, fondi internacian Esperanto-bibliotekon. Ĉeestante la kongreson en Gdańsk, Hugo Steiner senhezite transprenis la iniciaton:

“Estis la 31. de julio 1927, kiam en kunveno de la reprezentantoj de la Landaj Asocioj dum la XIX-a Univ. Kong. de Esp. en Danzig, kiun mi ĉeestis estante prezidanto de la Aŭstria Esperanto-Asocio, Felikso Zamenhof, la frato de nia neforgesebla Majstro Dro Ludoviko Lazaro Zamenhof, faris la proponon, krei okaze de la 50-jara jubileo de Esperanto ie en la mondo Internacian Esperanto-Bibliotekon. (...) Reveninte el Danzig mi tuj ekagis.”¹

Ekde la komenco Hugo Steiner intencis katalogi ne nur librojn kaj gazetojn, sed lia Esperanto-biblioteko ankaŭ plenumu muzeajn kaj arkivajn funkciojn, kaj tial li ankaŭ kolektis fotografaĵojn, muzeajn objektojn, afiŝojn, glumarkojn kaj arkivaĵojn. Krome Steiner ekkonservis ne nur literaturon en kaj pri Esperanto, sed ĝenerale materialon pri planlingvoj. Tamen li elektis la nomon “Internacia Esperantomuzeo”, ĉar li supozis, ke ĉirkaŭ 90 procentoj de la havaĵo koncernos Esperanton. Tio signifas, ke laŭnome temis pri centro de dokumentado pri Esperanto, sed fakte la Esperantomuzeo estis ekde sia fondiĝo muzeo, biblioteko kaj arkivo pri planlingvoj, kion Hugo Steiner retrospektive komentis jene:

“Ŝajnis al mi, ke la fondo de simpla biblioteko ne sufiĉus, kaj mi decidis starigi pli ampleksan Instituton [sic] kun pli vaste fiksitaj celoj, nome kolekti kaj konservi la tutan materialon, ligitan kun la historia movado de Esperanto kaj de la mondhelplingvaj sistemoj kaj mondlingvaj problemoj sur scienca bazo kaj dokumente pruvi la disvastiĝon de Esperanto en la tuta mondo.”²

¹ Steiner, Hugo (1957): Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Parto I.: Sistema Katalogo pri la Esperanto-presajĵoj laŭ la Internacia Dekuma Klasifiko. Wien: Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, IX.

² Steiner (1957): Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Parto I., IX.

La 20-aj jaroj de la 20-a jarcento estis florepoko de Esperanto en Aŭstrio – same kiel en multaj aliaj eŭropaj landoj – kaj tial la jaro 1927 estis tre favora por fondo de Esperantomuzeo: en 1922 okazis en Vieno pli ol 70 Esperanto-kursoj, kiuj ĉefe estis organizitaj de policianoj, laboristoj kaj katolikoj.³ Membro de la forta laborista Esperanto-movado en Aŭstrio estis ankaŭ Franz Jonas (1899-1974),⁴ kiu eklernis Esperanton en 1922 kaj redaktis ekde 1926 dum pluraj jaroj la socialdemokratran Esperanto-gazeton “La socialisto”.

Bildo 1: La socialisto, 1926



En Aŭstrio ankaŭ konservativaj politikistoj okupiĝis pri Esperanto en Aŭstrio, precipe progresigis la lingvon Johann Schober (1874-1932), kiu estis siatempe unu el la plej eminentaj politikistoj.⁵ Fine de la 20-aj jaroj Johann Schober aktive partoprenis la “Esperanto-vivon”,⁶ li subtenis Esperanton per sia politika aŭtoritato, kaj tial li ankaŭ konatiĝis kun Hugo Steiner. En biografia noto Hugo Steiner eĉ atentigis, ke fakte Johann Schober estis la decida forto kaj dum la fondiĝo de la Esperantomuzeo kaj dum ĝia alligo al la Aŭstria Nacia Biblioteko.⁷



Bildo 2: Hugo Steiner (2-a de maldekstre), Johann Schober (3-a de maldekstre) kaj Josef Bick (4-a de maldekstre) en la Esperantomuzeo, Vieno 1931

³ Afŝo: Wegweiser für Unterricht u. Fortbildung in Esperanto. Anfängerkurse und Übungszirkel in Wien, 1922. Signo: ÖNB ESP Pla-5-207.

⁴ Noto: Franz Jonas iĝis post la dua mondmilito urbestro de Vieno (1951-65) kaj poste prezidento de la Aŭstria Respubliko (1965-74).

⁵ Noto: Dum tiu tempo, dum la 20-aj jaroj, Johann Schober estis unu el la plej eminentaj aŭstria politikistoj, interalie Schober estis prezidanto de la viena polico (1918-1932), unua prezidanto de Interpol (1923-1932), li estis ministro pri instruado, pri ekonomio, pri eksterlandaj aferoj kaj Johann Schober ankaŭ estis trifoje federacia kanceliero de Aŭstrio.

⁶ Noto: Interalie Johann Schober partoprenis la 7-an Aŭstrian Esperanto-Kongreson (1927), kiun li ankaŭ prezidis.

⁷ Noto: „1927 begann ich mit den Vorarbeiten zur Gründung des Internationalen Esperanto-Museums in Wien, dem einzigen in der Welt. Ich fand hierbei größte Förderung durch den damaligen Polizeipräsidenten Schober und dann besonders als er Bundeskanzler war.“ Steiner, Hugo (1938): Mein Leben und Wirken (= neeldonita tiposkripto en la Kolekto por Planlingvoj. Signo: 1,954.798-C.Esp).

La solena malfermo de la Internacia Esperantomuzeo okazis en aŭgusto 1929 en la pompa salono de la Aŭstria Nacia Biblioteko. La inaŭguron ĉeestis ĉirkaŭ 600 gastoj el pli ol 30 landoj, inter ili ankaŭ Lidia Zamenhof (1904-1942), Julia Isbrücker (1887-1971), Odo Bujwid (1857-1942), Hugo Steiner, Johann Schober kaj Wilhelm Miklas (1872-1956), la tiam prezidento de Aŭstrio.



Bildo 3: Solena malfermo de la Internacia Esperantomuzeo, Vieno 1929

1.2 Fermo per la Gestapo kaj re-malfermo post la dua mondmilito

Origine troviĝinte en iama ĉevalstalo en la centro de Vieno, la Esperantomuzeo situis dum la 30-aj jaroj en la dua etaĝo de la Hofburg ĉe Heldenplatz. Tiam la havaĵo sufiĉe rapide pliampleksiĝis, precipe pro multaj donacoj. Tiu pozitiva evoluo finiĝis pro la aneksado de Aŭstrio, en marto 1938, kiam la Gestapo, la nazia sekreta polico, fermis la Esperantomuzeon:

“La 11-an de marto 1938 Steiner devis paroli en Radio-Wien, sed la saman tagon jam estis enmarŝantaj la trupoj de Hitler. Mi skribis al la Ĝeneraldirektoro de Nacia Biblioteko, ke mi konfidis s-anon Reg. Kons. Fritz STENGEL anstataŭi min kaj duontage ankoraŭ laboris en la Muzeo ĝis la 20.IV. [20.III], por ordigi la kancelarion. Kiam mi la 20.IV. [20.III] posttagmeze venis en la Muzeon, ĝi estis fermata de GESTAPO.”⁸

Post la fermo la Gestapo intencis transporti la tutan havaĵon de la Esperantomuzeo al Berlino, kie ĝi plej verŝajne estintus detruiita, sed la tiam ĝenerala direktoro de la Aŭstria Nacia Biblioteko, Paul Heigl (1887-1945), povis interveni kaj preventi tion per letero, en kiu li substrekis, ke la planlingva materialo estas posedaĵo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, kaj tial ne rajtas forlasi Vienon.⁹ Pro tio la havaĵo estis metita en kestoj, poste stokita en la keloj de la Hofburg, kaj tiel ĝi bonŝance ne perdiĝis dum la dua mondmilito.

⁸ Steiner (1957): Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Parto I., XXIX.

⁹ Köstner, Christina (2005): Glück im Unglück. Das Esperantomuseum an der Nationalbibliothek Wien 1938-1945. En: Language Problems & Language Planning 29/2, 177-186.



Bildo 4: Palais Mollard, Wien, Herrengasse 9

En 1947 la Esperantomuzeo estis denove malfermita en la Hofburg, nun en la 3-a etaĝo ĉe Michaelerplatz. En tiu subtegmenta etaĝo la kondiĉoj rilate la ĉambrojn kaj la klimaton estis relative malfavoraj, sed ekzistis ankaŭ progresoj, ĉar la Esperantomuzeon nun prizorgis du bibliotekistoj, kiujn disponigis la Aŭstria Nacia Biblioteko: Walter Hube (1923-2000), kiu iĝis direktoro post la morto de Hugo Steiner en 1969, kaj Herbert März (1929-1995).

Post la 2-a mondmilito la plej grava atingo estis la daŭra pliampleksigo de la havaĵo, sed la efiko eksteren sur la publikon estis relative malgranda. Ĝis la 80-aj jaroj ne ekzistis muzea koncepto, kaj krom tio ankaŭ mankis la financaj rimedoj por modernigo de la muzeo. Tiu malagrabla situacio nur ekŝanĝiĝis fine de la 80-aj jaroj, kiam Herbert Mayer fariĝis direktoro de la Internacia Esperantomuzeo.

Kiam d-ino Johanna Rachinger iĝis la ĝenerala direktorino de la Aŭstria Nacia Biblioteko, en 2001, ankaŭ komenciĝis nova epoko por la planlingva sekcio. Johanna Rachinger tuj perceptis la mankojn kaj tial ŝi komencis en 2003 la translokiĝon de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo en la teretaĝon de la Palais Mollard, kiu situas en Herrengasse 9, tre proksime de la antaŭa sidejo.

2. Havaĵo

En la nova loko, kiu estis inaŭgurita en 2005, ne nur troviĝas la Esperantomuzeo kaj la legsalono de la Kolekto por Planlingvoj, sed ankaŭ la problemo de malgranda spaco por la havaĵo estis solvita per plej moderna kaj ampleksa konservejo. La magazeno, kiu nun grandas ĉirkaŭ 180m², estas klimatizita kaj sekura kontraŭ incendio, ĝi protektas la tutan havaĵon de la Kolekto por Planlingvoj kaj enhavas ĉirkaŭ:

- 40.000 flugfoliojn
- 35.000 volumojn
- 25.000 gazetartikolojn
- 22.000 fotojn kaj fotonegativojn
- 10.000 manuskriptojn kaj aŭtografojn
- 3.100 diversajn gazetojn kaj revuojn
- 3.000 muzeajn objektojn
- 1.200 afiŝojn
- 850 aŭd-vidajn materialojn

En tiu kunteksto ankaŭ menciendas, ke ne estas kalkulitaj duoblaĵoj, tial la realaj nombroj estas efektive pli grandaj ol la menciitaj. Kun tiu havaĵo la Kolekto por Planlingvoj estas mondscale unu el la plej ampleksaj fakbibliotekoj pri Esperanto, planlingvoj kaj interlingvistiko.

Kiel parto de la Aŭstria Nacia Biblioteko la Kolekto por Planlingvoj plenumas ĉiajn taskojn kaj postulojn de moderna biblioteko.¹⁰ La konkretaj celoj estas:


- pligrandigi la havaĵon per daŭra kolektado
- konservi kaj protekti la planlingvan materialon
- katalogi la tutan havaĵon
- disponigi la kolekton al la publiko
- respondi demandojn, skribe kaj buŝe
- esplori kaj publikigi dokumentojn kaj objektojn

3. Projektoj

3.1 La biblioteka katalogo Trovanto

En la Kolekto por Planlingvoj komenciĝis en 1996 la elektronika katalogado de libroj, gazetoj kaj revuoj, en 2005 la retrospektiva katalogado finiĝis, kaj tiam ankaŭ realiĝis la datumigrado en novan biblioteksistemon (Aleph).

Tiel oni povas jam dum preskaŭ 20 jaroj tute sendepende de loko kaj horo traserĉi la havaĵon per la katalogo Trovanto, kiu estas parto de la ĝenerala katalogo – la tiel nomata Quicksearch – de la Aŭstria Nacia Biblioteko. Trovanto estas alirebla per la retejo de la Kolekto por Planlingvoj, kiu estas legebla ne nur en la germana kaj la angla, sed ankaŭ en Esperanto.



Bildo 5: Serĉrezultoj en la katalogo Trovanto

La katalogeroj en Trovanto ricevas kapvortojn en la germana kaj en Esperanto, tial ambaŭ lingvoj estas uzeblaj por reserĉado. Pro la integrado de la bildkatalogo – Bildarchiv Austria – en Quicksearch oni povas ekde 2013 traserĉi per Trovanto ĉiujn katalogitajn materialojn – pli ol 50.000 katalogerojn – de la Kolekto, ne nur librojn, gazetojn kaj revuojn, sed ankaŭ

¹⁰ Mayer, Herbert (2008): Eine traditionelle Bibliothek und neue Herausforderungen: Die Sammlung für Plansprachen der Österreichischen Nationalbibliothek. En: Blanke, Detlev (eld.): Plansprachliche Bibliotheken und Archive. Beiträge der 17. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23.-25. November 2007 in Berlin (= Interlinguistische Informationen, Beiheft 15). Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 33-36.

kompaktajn diskojn, DVD-ojn, sonbendojn, bilddokumentojn – fotojn, bildpoŝtkartojn, glumarkojn, muzeajn objektojn, afiŝojn – kaj arkivaĵojn¹¹.


La katalogeroj de la bilddokumentoj enhavas kaj skribitan informon kaj bildeton de la koncernanta objekto. Krome de tio la datenaro de pli ol 700 libroj¹² kaj 65 diversaj periodaĵoj¹³ havas rektan ligilon al la diĝita verko, por ke bibliotekuzantoj povu tute libere kaj senpage foliumi kaj legi ilin ĉe ĉiu ret-alio, ankaŭ ekstere de la Aŭstria Nacia Biblioteko.

Tiu servo ankaŭ montras, kiel la explorebloj kaj uzebloj ŝanĝiĝis dum la pasintaj 25 jaroj. En 1990 leganto devis – ankoraŭ per relative granda elspezo de tempo – iri al la biblioteko, traserĉi la katalogon de slipoj, mendi la presaĵojn surloke kaj atendi ĝis kiam li povis legi ilin en la legsalono, sed nuntempe reserĉado kaj mendado eblas komforte per la interreto.

Pro la daŭre kreskanta nombro de ciferecigitaj verkoj ofte eĉ ne necesas iri surloken en la bibliotekon por ricevi la deziritajn informojn, ĉar jam multaj diĝitaj verkoj estas rigardeblaj per la katalogo Trovanto.

Alia granda avantaĝo de ciferecigado estas la senfinaj malfermaj horoj de la virtuala legsalono, kiu estas – alirebla per la retejo de la Aŭstria Nacia Biblioteko – malfermita 24 horojn en unu tago, en 7 tagoj dum la semajno kaj kiu iĝas daŭre pli ampleksa pro la regula aldonado de novaj reproduktaĵoj. La apliko kaj uzo de la interreto tiel kaŭzas masivan ŝanĝon de utiligstrategioj, relative ampleksan virtualan legsalonon kun permanentaj malfermaj horoj kaj sekve de tio instigon kaj intensivigon de sciencaj esploroj.

Trovanto ebligas elekti inter du serĉmanieroj, konsekvence la reserĉebloj estas tre variaj. Alternative al la “simpla serĉo” (“Einfache Suche”) oni povas ĉe la “ampleksa serĉo” (“Erweiterte Suche”) entajpi serĉvortojn en maksimume 3 diversaj kategoriekampoj, kiuj poste estas kombinitaj. Rekomendindaj serĉvortoj estas titoloj, eldonjaroj, eldonejoj kaj nomoj de aŭtoroj aŭ korporacioj.



Bildo 6: Ampleksa serĉo en Trovanto


Ekzemple reserĉo laŭ la vorto “interlingvistiko” nuntempe (oktobro 2016) rezultigas liston kun entute 225 titoloj respektive katalogeroj. Por precizigi la reserĉon kaj malpliigi la

¹¹ Notu: Inter la arkivaĵoj, kiuj estas konservitaj en la Kolekto por Planlingvoj, troviĝas ankaŭ 47 antaŭ- kaj postlasaĵoj (oktobro 2016). La plej ampleksaj de ili estas jenaj de Kálmán Kalocsay (1891-1976), Eugen Wüster (1898-1977), Engelbert Pigal (1899-1978), Walter Mudrak (1904-1998), Andreas Juste (1918-1998), Jacques Bol (1922-2009) kaj Manuel de Seabra (1932*).

¹² Notu: La skanitaj libroj koncernas precipe la fruajn Esperanto-presaĵojn, kiuj estis publikigitaj antaŭ 1910.

¹³ Notu: Entute estis ciferecigitaj ĉirkaŭ 700 jarkolektoj (komence de 2016) el la periodo inter 1889 kaj 1943.


nombron de la katalogeroj, oni povas “filtri” la liston per la facedoj, kiuj troviĝas je la maldekstra flanko de la katalogo. Tiel eblas limigi la nombrojn de trafoj laŭ diversaj kategorioj – materialo, eldonjaro, temo, persono aŭ institucio, lingvo kaj formo – kaj optimumigi la serĉrezultojn.



Bildo 7: Reserĉo laŭ la vorto interlingvistiko

3.2 La bilddatumbanko – Bildarchiv Austria

Ekde la jaro 2007 granda parto de la 22.000 fotografiaĵoj de la Kolekto por Planlingvoj estas sisteme skanita kaj katalogita en la bilda katalogo de la Aŭstria Nacia Biblioteko, la tiel nomata Bildarchiv Austria. Krome de tio ankaŭ realiĝis ampleksa ciferecigo kaj katalogado de bildpoŝtkartoj, glumarkoj, muzeaj objektoj kaj afiŝoj tiel, ke nuntempe troviĝas pli ol 17.000 katalogeroj en la datumbanko. El ili ĉirkaŭ 12.000 estas serĉeblaj per la interreto.



Bildo 8: Bilddokumentoj de la Esperantomuzeo en la “Bildarchiv Austria”

La Bildarchiv Austria, kiu same kiel la katalogo Trovanto estas alirebla per la retejo de la Kolekto por Planlingvoj, ebligas je la maldekstra flanko du serĉmanierojn, la rapidan serĉon (“Schnellsuche”) kaj la profesion serĉon (“Profisuche”), ĉe kiu oni povas entajpi vortojn en pluraj kategorikampoj. Rekomendindaj serĉvortoj – la lingvo de dokumentado en la bilda katalogo estas nur la germana – estas nomoj de personoj, landoj kaj urboj aŭ jarnumeroj kaj okazintaĵoj, ekzemple kongresoj.

4. La Esperantomuzeo

La Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko estas mondscale unu el la plej tradiciriĉaj lingvomuzeoj kaj unu el la plej gravaj siaspecaj institucioj. Ĝi kolektas kaj prezentas diverstipajn dokumentojn kaj objektojn pri la temoj “Esperanto” kaj “interlingvistiko”. La muzeo estas fake, administre kaj space ligita kun la Kolekto por Planlingvoj, kiu dokumentas entute ĉirkaŭ 500 planlingvajn projektojn.

Pro ĝia favora situo en la centro de Vieno multaj personoj perceptas kaj vizitas la Esperantomuzeon, kiu estas grava pordo al la publiko. En la pasintaj jaroj la nombro de vizitantoj daŭre kreskis, ankaŭ pro la fakto, ke la muzeo direktas sin al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la fenomeno lingvo. Rilate la ekspozician spacon – ĉirkaŭ 80m² – la Esperantomuzeo starigis en 2013 tre rimarkindan rekordon, kiam 14.288 personoj vizitis ĝin. Tio signifas, ke ene de nur 10 jaroj la nombro de la vizitantoj pli ol kvinobliĝis (2003: 2.644 vizitantoj).

La Esperantomuzeo ne nur prezentas la lingvon Esperanto kaj temojn el la historio de la Esperanto-movado, sed ankaŭ ĝenerale la rilaton de homo al lingvo kaj al la lingva problemo. La muzeo montras, ke planlingvoj ekestis en specifaj kaj konkretaj, historiaj kaj kulturaj kuntekstoj, kaj tiel ĝi ankaŭ ilustras, ke Esperanto estas parto de kulturhistorio kaj manifestado de speciala lingva kreiveco.



Bildo 9: Esperantomuzeo



Bildo 10: Esperantomuzeo

Filmo kaj objektoj en vitrinoj klarigas la historian dimension de la fenomeno planlingvo kaj kvar interaktivaj komputiloj ebligas aktivan informadon, per kiu la vizitanto mem povas elekti la ampleksojn de la informoj. Video-kurso donas enrigardon en la Esperantan gramatikon kaj peras impreson kiel sonas parolata Esperanto. Sed krom Esperanto ankaŭ aliaj planlingvoj estas prezentitaj, ekzemple la Lingua Ignota de Hildegard de Bingen (1098-1179), la muzika lingvo Solresol de Jean François Sudre (1787-1862), la Novslava lingvo de Ignaz Hošek (1852-1919) aŭ la Klingona de la lingvisto Marc Okrand (1948*).

Bibliografio

Blanke, Detlev (2008, eld.): Plansprachliche Bibliotheken und Archive. Beiträge der 17. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 23.-25. November 2007 in Berlin (= Interlinguistische Informationen, Beiheft 15). Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik.

Gastgeber, Christian et al. (2009, eld.): Change! Zukunft gestalten. Festschrift für Johanna Rachinger (= Biblos-Schriften. Beiträge zu Buch, Bibliothek und Schrift. Band 180). Wien: Phoibos-Verlag.

Hube, Walter (1967a): 40 Jahre Internationales Esperanto-Museum. En: Biblos. Österreichische Zeitschrift für Buch- und Bibliothekswesen, Dokumentation, Bibliographie und Bibliophilie 16/3, 149-153.

Hube, Walter (1967b): 40 Jahre Internationales Esperanto-Museum, 90. Geburtstag von Hofrat Hugo Steiner (= nepublikigita tiposkripto en la Kolekto por Planlingvoj, signo: 709.582-C.Esp-2).

Kölbl, Andrea et al. (2012, eld.): Zwischen Utopie und Wirklichkeit. Konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt. Begleitband zur Ausstellung an der Bayerischen Staatsbibliothek (14. Juni bis 9. September 2012). München: Allitera Verlag.

Köstner, Christina (2005): Glück im Unglück. Das Esperantomuseum an der Nationalbibliothek Wien 1938-1945. En: *Language Problems & Language Planning* 29/2, 177-186.

Mayer, Herbert / März, Herbert (1987): Der Welt eine Sprache. Das Internationale Esperantomuseum. En: *Mazal* 1987, 318-322.

Mayer, Herbert (1989): Das internationale Esperanto-Museum. Sammlung für Plansprachen. En: *Biblos. Österreichische Zeitschrift für Buch- und Bibliothekswesen, Dokumentation, Bibliographie und Bibliophilie* 38/3, 188-191.

Mayer, Herbert / Cimpa, Christian (1992): *La Internacia Esperanto-Muzeo. Historio, taskoj, perspektivoj*. Wien: IEM.

Mayer, Herbert (2008): Eine traditionelle Bibliothek und neue Herausforderungen: Die Sammlung für Plansprachen der Österreichischen Nationalbibliothek. En: *Blanke* 2008, 33-36.

Mayer, Herbert (2009): Wachgeküsst. Das Esperantomuseum. En: *Gastgeber et al.* 2009, 71-74.

Mayer, Herbert (2012): Die Sammlung für Plansprachen der ÖNB: Geschichte und Gegenwart. En: *Kölbl et al.* 2012, 151-163.

Mazal, Otto (1987, red.): Ein Weltgebäude der Gedanken. Die Österreichische Nationalbibliothek. Graz: Akademische Druck- u. Verlagsanstalt.

Steiner, Hugo (1938): *Mein Leben und Wirken* (= unveröffentlichtes Typoskript in der Sammlung für Plansprachen, Signatur: 1,954.798-C.Esp).

Steiner, Hugo (1957): *Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Parto I.: Sistema Katalogo pri la Esperanto-presaĵoj laŭ la Internacia Dekuma Klasifiko*. Wien: Internacia Esperanto-Muzeo en Wien.

Steiner, Hugo (1962): *La Scienca Instituto de la Internacia Lingvo... La Internacia Esperanto-Muzeo en Wien* (= unveröffentlichtes Typoskript in der Sammlung für Plansprachen, Signatur: 707.608-C.Esp-).

Steiner, Hugo (1963): *Vivo en la servo de la popolinterkompreniĝo*. Wien: Internacia Esperanto-Muzeo.

Claude GACOND: *Ĉu esperanto progresis?*



Ekde kiam mi komencis praktiki esperanton, mi estis konfrontita al du tipaj demandoj: *Kio estas esperanto?* kaj *Ĉu esperanto progresas?* Al ambaŭ ne facilas respondi, sen alporti precizajn prilingvaj klarigojn.

Nin fakte ĉirkaŭas du publikoj: tiu de la nekonantoj pri la ekzisto mem de esperanto kaj pri la ideo mem de lingvo internacia, kaj tiu de la konantoj de la esperanto-fenomeno faciliganta internaciajn rilatojn. Sed tiu dua publiko pli malpli bone informita pri la disvolviĝo de tiu por ĝi mistera lingvo, sin reale demandas, kiel ĝi funkcias.

Ĉiam malfacilas respondi. Mi plej ofte kontentigas simple aserti, ke jes esperanto bone progresas! Kaj nur kiam mi sentas realan informemon ĉe demandinto, tiam mi provas iom raporti pri la progresado de esperanto.

Sed fakte ni mem, praktikantoj de esperanto, kiel ni perceptas tiun progreson de la zamenhofa lingvo?

Al tio mi provos respondi laŭ miaj propraj travivaĵoj post rakonto, kiel mi iom post iom alvenis al esperanto.

Mia iompostioma aliro al esperanto

Mi fakte eksciis pri la ekzisto de esperanto per artikoloj de Edmond Privat aperantaj en la gazetoj *Coopération* kaj *L'Essor*, kie de tempo al tempo esperanto estis menciata. Kiam mi frekventis la duagradan lernejon, mi komencis tre regule viziti la leg-salonon de la Biblioteko de la urbo Neuchâtel situanta en mia lernejo Le collège latin, kaj mi malkovris, ke ankaŭ en la laborista taggazeto *La Sentinelle* aperadas artikoloj de Edmond Privat. Liaj mencioj, ke lia informinto estas esperantisto ekvekis mian intereson al esperanto mem, kaj mi serĉis per-librajn informojn pri tiu lingvo. Sed fakte ĉefe dokumentojn pri la asertite pli perfektaj lingvoj *Ido* kaj *Occidental* mi akiris. Dum la esperantistoj neglektis diskonigi sian lingvon tra la kanalo de la bibliotekoj, tion kontraŭe lerte efektivigis la idistoj kaj occidentalistoj. Ĉefe kritikojn kontraŭ la supersignoj kaj akuzativo de esperanto mi tralegis malkovrante la facilecon kaj simplecon de *ido* kaj *occidental*.

En mia familio ekzistis tradicio, ke post la deviga lernej-periodo la sekvan jaron okazu stud-restado en Germanio. Tiun eksterfamilian jaron en alilingvio mi efektivigis en 1946-1947 en la privata lernejo *Ecole d'Humanité* en la Oberlanda vilaĝo Goldern. Kaj tie mi fine reale aŭdis paroli en esperanto. Mia profesoro de matematiko Gerard Cool ankaŭ instruis esperanton, kaj mi aliĝis al tiu stud-rondo. Sed mia germanlingva profesorino baldaŭ atentigis min per verkoj de sia eks-edzo Fritz Haas, ke esperanto pli komplikas ol *occidental*, kaj aldone ŝi asertis, ke lernado de la artefarita esperanto povus perturbi tiun de naturaj fremdaj naci-lingvoj, kio ĉesigis mian pluan ekstudon de esperanto. La lerneja direktoro Paulus Geheeb organizis prelegojn, kiam lin vizitis pedagogoj. Plurfoje tiuj negermanlingvaj prelegantoj, kiujn li tradukis germanen frazon post frazo, sin esprimis en esperanto. Tiam mi sentis la vivantecon de tiu planlingvo malgraŭ ties kritikataj supersignoj kaj akuzativo.

Dum miaj liceaj studoj en Neuchâtel (1947-1951) mi dediĉis grandan parton de miaj ferioj al deĵorado en laborejoj de la Civil-Servo Internacia, kie mi ree aŭdis paroli en esperanto kaj mi konstatis, ke en plurlingva medio diskutoj esperantlingvaj fakte disvolviĝas pli efike, ol kiam la inter-lingvo estas la angla. Miaj ekkonoj akiritaj en l'Ecole d'Humanité ebligis al mi eĉ sufiĉe aktive partopreni en esperantlingvaj diskutoj.

En mia universitata studjaro (1951-1952) mi eklernis etnologie observi homgrupojn, kaj kiel stud-medion mi elektis praktikantojn de planlingvoj. Per vizitoj al Edmond kaj Yvonne Privat en Neuchâtel kaj Jules Gilliard en La Neuveville mi konatiĝis kun la esperanto-medio, kaj per vizitoj al la familio Kreis-Schneeberger en Ĝenevo la ido-medion mi malkovris. La kontaktitoj por occidental estis la instruistoj Fred Lagniel en Corseaux kaj Ric Berger en Morges. Simpation mi akiris por tiuj kultivantoj de planlingvoj, kiuj optimisme verkemis en la elektita idiomo kun kritikemo al la konkurantaj sistemoj. En ilia apartamento abundis libroj ne nur planlingvaj, sed ankaŭ beletraj kaj artaj, kiuj respegulis ilian vojaĝemon kaj klerecon. Mi ĉiam revenis el tiuj vizitoj kun abunda materialo prilingva trastudinda. Tra la praktiko de propre elektita planlingvo, ĉiu konvinkis, ke li posedas la ŝlosilon al racia solvo de la interlingvaj problemoj. Sed ankaŭ ĉiu rigardis al la konkurantaj planlingvoj kun konvinko pri la supereco de la propre elektita.

Poste kiam mi ekfrekventis la esperanto-publikon, fakte en simila medio mi retroviĝis, kaj tio verŝajne plue karakterizos la esperanto-mondon, tiom longe kiam esperanto restos minoritata lingvo.

Sed diferencon mi tuj rimarkis frekventante tiujn diversajn planlingvajn mediojn. Dum en la esperanta regis optimismo kaj progesa sento, en la ido- kaj occidental-medioj, tiam sentiĝis mov-rezigno kaj reala impresio, ke okazas nenio nova.

Kaj fakte montriĝas, ke dum esperanto reale plu progresis, ido kaj occidental, same kiel interlingua propagandita ekde 1952, pli kaj pli ĉesis ekzisti. Kiuj nun tiuj ekstudas esperanton, tiuj ne estas konfrontitaj al la planlingva plureco, kiel tio okazis al mi. Tio fakte signifas gravan progresan situacion por esperanto.

Sinsekvo de realaj progresoj ekde 1954

En 1952, kiam mi fine aktive ekpraktikis esperanton, vigla propagando por interlingua el Novjorko certe estis malfavora al esperanto mem. Sed jam je la 10-a de decembro 1954 Rezolucio de Unesko en Montevideo agnoskis la kulturan valoron de esperanto. Kaj je la sekva januaro 1955 William Auld dediĉis al Ivo Lapenna, la triumfinto en Montevideo, sian ĉefverkon La infana raso, kiun tuj publikigis Juan Régulo Pérez per sia eldonejo Stafeto en La Laguna. Kaj naskiĝis samjare du novaj kulturaj revuoj Norda Prismo en Svedio redaktata de Ferenc Szilágyi kaj La nica revuo en Nice redaktata de Gaston Waringhien. Tuj poste la romanoj Vojaĝo al Kazohinio de Sándor Szathmári kaj Kiel akvo de l' rivero de Raymond Schwartz kaj la dramo Sonĝe sub pomarbo de Julio Baghy entuziasmigis nin.

La junularo fariĝis ege aktiva en la parola kaj lega praktikado de esperanto. Okaze de la 9-a Junulara kongreso de TEJO en Wörgl en 1953, kiun mi ĉeestis kun Eric Benoît, kiel mi studanto en la porinstruista lernejo de Neuchâtel, ni kolektive silentigis la kongresanojn nacilingve parolantajn per korusa kokina blekado: kot-kot-kot aŭ per korusa kriado ovo, ovo, ovo! La sekvan jaron 1954 en la 10-a TEJO-kongreso en Hilversum la malamika besto fariĝis la krokodilo de la Cseh-Metodo, kiun ni fiksis kaŝante la pint-kalkanen ŝuon en ruĝa cirklo malpermesantan eniri la salonon tiel ŝuita. Kaj la korusa kriado krokodilo provis silentigi la kongresanojn, kiuj parolis nacilingve. Samkongrese la silentiga krio baldaŭ evoluis al ne estu krokodilo kaj al ne krokodilu!



Claude GACOND en la 10-a TEJO-kongreso en Hilversum, en 1954

Kiel sekretario de la Esperanto-Junularo de Svislando mi membris en la Centra Komitato de Svisa Esperanto-Societo. Kaj per la ordono ne krokodilu! mi provokis veran revolucion en tiu medio ĉefe germanlingva. Tiuj german-svisoj devis ĉesi babili alemane en mia ĉeesto kaj en tiu de Edmond Privat. Unue ili sentis sin profunde insultitaj de mi kaj mi devis klarigi, kion signifas ne krokodilu! Verŝajne por la unua fojo ili devis ekpeni sin esprimi esperantlingve en librotendaj diskutoj, kaj helpe de vortaro ili devis serĉi la fakajn vortojn mankantajn en ilia mizera esperanto.

La ordono ne krokodilu! tre rapide disvastiĝis en tuta esperantujo. Ĝi sentigis la bezonon, ke en esperanto-medio reale praktikiĝu la lingvo internacia. Tio fakte signifis gigantan progreson lingvan, kiu rapide riĉigis la parolkapablon de la esperantistaro. Ekmalaktualiĝis la poemo Estas mi esperantisto! de Julio Baghy. Fine povis riĉiĝi la esperanto-literaturo pro la vortara riĉiĝo mem de la nova esperanto-publiko ĉefe junulara.

La trastudo de la tre grava Historio de la esperanta literaturo verkita de Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer, ĵus aperinta pasintjare, konsciigas pri la eksterordinara beletra dinamismo, kiu karakterizis esperanton ekde tiu jaro 1954. Okazis vera montevidea renesanco unue dank' al la kuraĝa eldona dinamismo de Juan Régulo Pérez, universitata profesoro en La Laguna, kiun la frankisma reĝimo ne kapablis silentigi, kiel okazis rilate al esperanto mem en tuta Hispanio. Kaj ankaŭ baldaŭ novaj eldonejoj pli malpli en ĉiuj kontinentoj komencis publikigi verkojn de novaj aŭtoroj. Fine la literaturemuloj povis nelacigeble kontentigi sian beletran exploremon. Esperanto reale fariĝis aparte originala kulturlingvo. Kaj ĝis nun tiu fenomeno ne perdis sian vigecon. Kaj la verko Historio de la esperanta literaturo ebligas fine pli serioze antaŭvidi la instruadon de esperanto je la licea kaj universitata niveloj. Granda progreso kondiĉe, ke ĝi ne elĉerpiĝu.

Ĉar unu el la handikapo de esperanto estas la tro rapida kaj ofte definitiva elĉerpiĝo de la beletraj verkoj. Reeldona manko poŝlibre de la plej valoraj beletraĵoj handikapigas la instruadon de la esperanto-literaturo. Tiom longe, kiam tio ne solviĝos, krom rete, esperanto bedaŭrinde malfacile instaliĝos en la studprogramojn de la superaj lernejoj, kaj ankaŭ la esperanto-publiko mem plue malfacile memkleriĝos. Kulture esperantujo fakte membras en la malriĉa tria mondo.

Sed la ĝenerala esperanta publiko ne konsistas nur el legemuloj. La esperantistaro, kiel ĉiuj aliaj etnoj, konsistas el homoj kun plej diversaj aliaj ŝatoj: se ili vojaĝemas, tiam ili povas viziti kongresojn. Kaj la fakdelegita indekso de la UEA-jarlibro ebligas al tiuj, kiuj kultivas

precizan hobion, facile rilati kun alilandaj samhobiuloj kaj eĉ renkontiĝi kun ili trans la landaj kaj lingvaj limoj. Esperantuje viglas tiaj translimaj renkontiĝoj inter samcelanoj ne krokodilemaj! Kaj la nunaj interretaj kontaktebloj, neimageblaj kiam mi esperantiĝis, kvazaŭ nuligis la geografiajn distancojn. Sen vojaĝi ni nun havas la eblon konstante renkontiĝi tra komputila ekrano. Jes, por esperanto mem tio signifas grandegan progreson, kiun vigle respegulas niaj ĉefaj revuoj, konserveblaj kiam ili restas paperaj.

Esperanto ne nur lingva, sed ankaŭ socia fenomeno

Kun mia amikino kaj baldaŭa edzino Andrée mi organizis 23 novjarajn internaciajn skiferiojn en la Oberlanda vilaĝo Adelboden, kie ĉia krokodilado estis strikte malebligita per mon- aŭ deĵor-punoj. Komuna vivo dektaga en primitiva ĉaledo rapide kreis agrablan kunlaboran etoson. Ĉiuj lertiĝis ne nur en la skiarto sed ankaŭ en la esperanta praktiko. Sur breto libroj nekutimaj altiris ĉies legemon: La libro de amo de Peneter, ŝercaj kaj pripensigaj verkoj de Raymond Schwartz, Edmond Privat, baldaŭ Kruko kaj Baniko, alportis kolektivon ridemon eĉ ekkonduke al manĝoj. Rezulte pluraj partoprenantoj tiel vigle intimiĝis al esperanto, ke baldaŭ ili akiris gvidrolojn nacilingve kaj eĉ kadre de UEA. Rimarkinde riĉiĝis ĉies parolkapablo rilate al la skiado kaj svisa vivo, ke la pretigantoj de la Plena Vortaro de Esperanto petis mian kunlaboron pri la ski-leksiko kaj pri Svislando.

Jam la vortoj ĉaledo kaj rakledo vekis tujan kontraŭstaron de Gaston Waringhien, kiu estus preferinta ĉaleto kaj rakleto, pro timo je kritiko fare de la interlingua-adeptoj. Ankoraŭ viglis la naturalisma influo de la ĵus mortinta novjorka IALA, kiun tamen daŭre personigis Aleksander Gode, la aŭtoro de la ĵus lanĉita Interlingua. Sed nia uzo rezistis. Nur koncerne al la vorto ĉaledo Waringhien apude konservis la naturalisman formon ĉaleto.

Tiel eniris en PIV ankaŭ la vortoj fonduo, skii, skiado, ski-bastono, ski-vakso, vaksi. Ni bone distingiĝis skiejon de skiadejo, skiiston de skianto. Anstataŭ ascendi ni preferis alsupri, el kio alsuprado, alsuprejo, kaj por descendi: alvali, alvalado, alvalejo. Ni devis lukti kontraŭ la falsa uzo de pisto per la vorto vego, kiu akiris ĝeneralan uzon koncerne al la sportaj konkursoj. Kaj la adjektivoj monta skio kaj vala skio ebligis bone distingi, kiun skion oni premu por sukcesi konvenan kristianion kaj sekve sukcesan ŝuson. La ek-skianto preferis ŝtemi, sed tiun verbon ne registris PIV, kiel ceteraj teknikaj vortoj, sed la nomo de nia urbo La Chaux-de-Fonds fine ricevis taŭgan esperantigon: Ĉaŭdefono. Kaj la arkivejo CDELI estis listigita inter la institucioj per sia statuta franclingva nomo Centre de documentation et d'étude sur la langue internationale.

Fakte reale progresis esperanto kaj ties praktiko en Svislando, kadre de kulturaj aŭ migradaj semajnfinaĵoj preskaŭ ĉiumonataj, kiuj disvolviĝis en naturamikaj aŭ junularaj renkontejoj. Kaj la tiamaj gejunuloj ĝenerale malriĉaj bonvenigis ankaŭ la oldulojn al partopreno, kondiĉe ke iliaj partoprenkostoj duobliĝu, kio ebligis krei monfonduson por repagi la vojaĝkostojn al la gejunuloj. Tiel povis veni gejunuloj ne nur el la tuta Helveta Konfederacio, sed ankaŭ el la najbaraj landoj. Kaj olduloj kiel Edmond Privat, Henri Vatré kaj René kaj William Perrenoud estis ŝatataj prelegantoj. Tutcerte nova esperanto-elito naskiĝis kadre de tiuj aranĝoj, kio favoris la kreon de Kultura Centro Esperantista, kies sidejo troviĝis unue en la subtegmentejo de mia domo en La Sagne.

Videble progresis esperanto lingve kaj kulture en Svislando.

Fruktodonaj kontaktoj kun adeptoj de aliaj planlingvoj

Tie en La Sagne venis min viziti knabo el Tiĉino. Li nomiĝis Tazio Carlevaro kaj estis lerninta la lingvon ido per lernolibro de sia avo. Kaj li ekaŭdis pri mia ekzisto fare de aliaj idistoj. Tuj inter ni ambaŭ naskiĝis kunlaboremo, ĝuste en la periodo de la kreo de la arkivejo Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia = CDELI en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Kun Tazio Carlevaro ni organizis plurajn idistajn renkontojn en La Chaux-de-Fonds, kaj tiuj partoprenantoj baldaŭ decidis heredigi sian planlingvan materialon al CDELI.



Tazio CARLEVARO en idista renkonto en La Chaux-de-Fonds, en 1972

Dum tiuj idistaj renkontoj, kaj interalie en tiu en kiu la belga idista poeto Andreas Juste estis petita prelegi dum tuta semajno pri sia verkaro kaj pri la kultura disvolviĝo de ido mem, Tazio Carlevaro vane provis parole praktiki idon al tiu publiko. Fakte ili tre ŝatis sian lingvon kaj aŭskultis kun atentemo la preleganton ĝin paroli, sed ne kutimis ĝin reale regi parole. Kiel la esperantistoj de antaŭ 1954, ili restis krokodiloj.

La samon mi rimarkis, kiam ni havis la okazon venigi kelkajn adeptojn de occidental aŭ eĉ de interlingua. Nur Alphonse Matejka, la redaktoro de la interlingvistike grava revuo Cosmoglotta, kiu loĝis en La Chaux-de-Fonds kaj fariĝis aktiva kunlaboranto de CDELI, reale kapablis sin esprimi parole en occidental.

Kun li kaj mia edzino mi aŭtomobilis al Sankt-Gallen por rikolti okcidentalan materialon ĉe la vidvino de Fritz Haas. Kaj mire mi renkontis tie ne nur la vidvinon Haas, sed ankaŭ mian profesoron de la germana en L'Ecole d'Humanité, kiu siatempe instigis min ne lerni esperanton. Fakte post renkontiĝo ĉe la tombo de Fritz Haas, ambaŭ eks-edzinoj Haas decidis kunvivi. Tagmanĝe Alphonse Matejka raportis pri nia kunlaboro ĉe CDELI, kaj kiam li eksciigis, ke mi kaj mia edzino estas esperantistoj, ambaŭ vidvinoj Haas ekkriis sian abomenon al esperanto, asertante ke ĝi estas kakofonia ĵargono! Tiam, kun granda miro mi kaj mia edzino aŭdis la okcidentalistan redaktoron de Cosmoglotta tre objekte raportoj pri la fleksebleco kaj belsoneco de esperanto kaj pri ties disvolviĝo beletra.

La sekvajn semajnojn, kiam ni kune ordigis la materialon kolektitan en Sankt-Gallen, Alphonse Matejka raportis pri sia verkado kun la sveda matematikisto C. E. Sjöstedt koncerne al grava verko en occidental-interlingue, tio pri la geometria evoluo. Li anoncis al mi, ke ambaŭ kune sentis la neceson reformi la lingvon occidental-interlingue. Li alvenis al la konvinko, ke kontraŭe al la lingvo-propono de Zamenhof rezultinta el multjara lingva elprovado, fakte ĉiuj aliaj proponoj de lingvo internacia kiel Volapük, Occidental kaj eĉ Ido, estis fakte nur projektoj ne eksperimentitaj. Kaj fakte la verko *Le axiome de parallèles de Euclides a Hilbert: un probleme cardinal in le evolution del geometrie* fine aperis en lingvo

occidental-interlingue vigle reprogramita, kiu celis ne plu esti nura projekto de lingvo, sed vivkapabla interlingvo.

Post la eldono de tiu certe tre grava verko kaj de ties aldonaĵoj, Alphonse Matejka bedaŭrinde ne havis plu la forton daŭrigi la redaktadon de Cosmoglotta en tiu plibonigita lingvo-formo.

Tiuj interlingvistikaj kontaktoj, kiujn mi havis kun la kunlaborantoj de CDELI, inter kiuj Alphonse Matejka, certe multe progresigis min en miaj esperantista kaj interlingvista aktivecoj.

* * * * *

Nicole MARGOT: *Pri Etnismo kaj etnaj liberecoj*



Unue mi ŝatus danki CDELI, Claude Gacond kaj Stefano Keller, pro ilia invito paroli al vi pri IKEL ĉar tio devigis min reiri en la fundamentojn de tiu asocio kaj repensi la ideojn ĉirkaŭ etnoj kaj etnismo. Kiel vi vidos la naskiĝo de IKEL prezentas multajn interesajn ideojn inter alie por la esperanto-movado, sed mi konscias, ke tiu tre utila pripensado estas nur komenco kaj devus esti daŭrigata.

Kiam kaj kial kreiĝis Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL)?

En la prezenta teksto de tiu ĉi prelego mi proponis paroli unue pri la naskiĝo de IKEL. Sed fakte la revuo ***Etnismo*** naskiĝis unue kaj tio gravas por kompreni la historion de tiu eta movado. Mi do respektos la realan dumtempan disvolviĝon.

Kaj tuj, en la 1-a numero de *Etnismo*, Uwe Joachim Moritz, fondinto de la revuo, klare anoncas sian intencon: «***Etnismo* estos nete ne neŭtrala. Ĝi traktos ĉiujn politikajn ekonomiajn kaj kulturajn problemojn koncerne etnoj, kaj ĝi propagandos certajn ideojn. Ni opinias, ke *Etnismo* utilos por konsciigi sian publikon pri larĝeco horizonta bezonata por funde kompreni la mondan lingvoproblemon. Luktado kontraŭ lingva diskriminacio neniel povas limiĝi al la ŝtataj lingvoj, sed ĝi devas, kondiĉe, ke ĝi estas sincera, konsideri samtempe la ŝtatinterne malfavoratajn lingvojn de etnaj minoritatoj.**»

27

IKEL-INFORMILO 1

NOVA PAŜO POR
INTEGRIGI ETNISTOJN
KAJ INTERNACISTOJN

Kiam, en 1972, la Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj kaj Kulturoj (AIDMLK), okaze de sia kongreso en Klagenfurt/Celovec (Karintio, Aŭstrio) decidis alpreni tiun ĉi nomon kiel unuan, sub kiu aperu alilingvaj formoj, la tiutempe ege malmultaj internacilingvaj membroj de AIDMLK aŭdacis esperi ke nomo estas programo. Evidentiĝis intertempe ke la plej multaj aktivuloj de AIDMLK, simile kiel tiuj de la esperantismaj organizoj, ne komprenas la interdependecon de la diversaj aspektoj de la lingva problemoj.

Post preparaj diskutoj dum la AIDMLK-kongreso en Barcelono, ĉi-julie, grupeto da integristoj fondis, en la kataluna ĉefurbo, la 25-an de septembro 1978 asocion sub la nomo

INTERNACIA KOMITATO POR ETNAJ LIBERECJOJ (IKEL).

Citaĵo el la statuto akceptita samdate plej klare montras la intencojn:

"2. Agad-principoj 2.1. La asocio bazas sian agadon sur la principo de konsistigaj elementoj de etno estas la komunaj denaska lingvo kaj tradicio. 2.2. La asocio tutmonde

2.2.1. - kolektas informojn pri la historio kaj nuna situacio de la etnoj

2.2.2. - disdonigas tiajn informojn per ĉiuj adekvataj rimedoj, precipe per publikaĵoj, seminarioj, prelegoj kaj manifestacioj

2.2.3. - intervenas ĉe lokaj, regionaj, ŝtataj kaj internaciaj institucioj kaj aŭtoritatoj por forigi diskriminacion kontraŭ etnoj

2.2.4. - pledas por la uzado de la internacia lingvo Esperanto en ĉiuj interetnaj rilatoj.

2.3. La asocio kunlaboras kun ĉiuj movadoj, institucioj kaj individuoj sur la kampo de batalado kontraŭ etna diskriminacio, restante tamen sendependa de kiu ajn parti-politika aŭ religia ideologio."

La fondintoj de IKEL elektis provizoran estraron, kiu ampleksas la laŭstatutan minimumon de 4 personoj: prezidanto - Uwe Joachim Moritz, Stolberg (FRG), vicprezidanto - Llibert Puig, Sabadell (Katalunio, Hispanio), sekretario - Francesc Ibáñez, Barcelono, kasisto - Llorenç Martí, Sabadell.

La jara membrakotizo estas 20,- gm kaj inkluzivas la abonon de ETNISMO, en kiu aperas la oficialaj informoj de IKEL.

La fondintoj decidis ke la unua ordinara membrakunveno okazu dum la 64-a Universala Kongreso en Lucerno, inter la 28-a de julio kaj la 4-a de aŭgusto 1979.

IKEL apelacias al ĉiuj aktivantoj en la kampo de etnaj/lingvaj problemoj ke ili membriĝu en IKEL, kiu klopodos esti peranto inter la du movadoj, tiu de la protektado kaj prosperigo de la minacataj lingvoj kaj tiu de la Internacia Lingvo.

La laŭstatuta sidejo de IKEL estas ĉe la prezidanto, do:

Feldstr. 38, D - 5190 Stolberg 8, F.R. Germanio.

(En n-ro 2o de ETNISMO estas aldonitaj la statuto kaj alifiljo.)

Fakte tiu ĉi unua numero, kun sia titolo mane desegnita, tute ne havas la aspekton de revuo, kaj kiel diras Uwe, ĝi estas informilo kaj «**Tiu ĉi informilo estas kaj restos teknike tre simpla (ĉar la enhavo pligravas ol eksteraĵo, kaj lukso ne estas ekonomia) kaj malmultekemplera (ĉar ĝi estas destinita por kelkdeko da aparte interesataj personoj)**».

Sed ĉu sufiĉas informilo? Ĉu tiuj interesataj personoj ne bezonas asocion por agi?

Tiuj interesatoj ja agas kaj oni povas konstati en tiu ĉi unua numero, ke iu «**Internacia Esperanto-Kongreso, okazanta de la 28-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 1972 en Antverpeno (1) kaj kunveniginta 462 personojn el 14 ŝtatoj, debatis pri la situacio de etnoj kies lingvoj kaj kulturoj estas minacataj.**» La kongreso decidis pri Rezolucio en 5 punktoj subtene al etnoj sen ebleco uzi sian lingvon. Ek de la **numero 2-a** oni raportas pri la 5-a kongreso de la **Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj (AIDMLK) (2)** dum pli ol paĝo kaj en la sama numero oni aperigas la tutan statuton de AIDMLK, akceptitan du la sama kongreso en Klagenfurto, informante pri la kotizo de tiu asocio. Kaj poste en preskaŭ ĉiuj numeroj ĝis la fondo de IKEL, oni retrovas informojn pri tiu asocio kiel la asocio de referenco.

Ŝajnas, ke ĉiuj fondintaj membroj de IKEL estis unue membroj de AIDMLK kaj agis por la rekono de Esperanto en tiu asocio. Ili sukcesis en 1972 akceptigi ke ties ĉefa nomo estu en Esperanto. Sed neniam ili sukcesis akceptigi Esperanton kiel laborlingvon. Maliluziigitaj pro tiu rifuzo, ili fondis Internacian Komitaton por Etnaj Liberecoj (IKEL) meze de kongreso de AIDMLK okazinta en 1978 en Barcelono. *Libert Puig*, unua vicprezidanto de IKEL foje rakontis, ke *Uwe Moritz*, post la malakcepto, verkis dumnokte la novan statuton por akceptigi ĝin la morgaŭon.

Pri tio oni povas legi en la numero 20 de ***Etnismo***, kie aperas la unua IKEL-*Informilo*. Tie oni lernas, ke la unuaj estraranoj estis *Uwe Joachim Moritz* platdiĉa germano/germaniano, kiel prezidanto kaj 3 aliaj katalunoj, *Llibert Puig* el *Sabadell*, vicprezidanto, *Francesc Ibanez* el Barcelono, sekretario kaj *Llorenç Marti* ankaŭ el *Sabadell*. La kvar do membris unue en la Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj (AIDMLK), kiu prenis tiun esperantlingvan nomon en 1972 (kiam aperis la unua numero de ***Etnismo***). «... **La tiutempe ege malmultaj internacilingvaj membroj de (AIDMLK) aŭdacis esperi ke nomo estas programo. Evidentiĝis intertempe ke la plej multaj aktivuloj de AIDMLK, simile kiel tiuj de la esperantismaj organizoj, ne komprenas la interdependecon de la diversaj aspektoj de la lingva problemoj.**»

Tio, laŭ mi estas la kerno de nia hodiaŭa pripenso: iufanke AIDMLK ne konsciis pri la graveco de lingvo politike neŭtrala por kontraŭstari la hegemonion de iuj ŝtataj lingvoj kaj la esperantistoj ne komprenis, ke justa rigardo al la lingva problemoj nur povas esti en la respekto de ĉiuj popoloj aŭ etnoj, ne nur de la naci-ŝtatoj.

Kelkaj vortoj pri la nocio “etnismo”

En franclingva artikolo de Vikipedio oni povas legi, ke la unua uzo de tiu vorto okazis en la franca fare de *Ferdinand de Saussure* en sia verko: “*Cours de Linguistique Générale*” (Kurso pri Ĝenerala Lingvistiko). Tiam tiu termino samsignifis, kiel la germana termino *Volkstum* (3). Tiu nocio, kiu ekzistis ekde la 19-a jarcento en centra kaj orienta eŭropo difinis nacion kiel lingvan komunumon. Ĝi estis reprenita de iu *François Fontan* el Francio, kiu fondis en 1959 la Partion de la Okcitana Nacio.

Mi tamen preferas repreni la diversajn klarigojn donitajn de IKEL, certe influitajn de la historio de tiu termino, sed kiu provis difini propran manieron aliri etnojn kaj etnismon. Tio estas la celo de tiu ĉi prelego.

En la unua numero de ***Etnismo*** ni povas legi de *Uwe Moritz*: «**Difinante “etnon” kiel la tuton de tiuj homoj, kiuj parolas denaske, senŝtata aŭ simila premo kaj principe sur**

ĉiuj kampoj de la homa vivo, la saman lingvo, ni esprimas per “etnismo” la ideon ke la etna grupo estas unu el la gravaj faktoroj determinantaj la homan vivon. Tamen: kvankam aparteno al unu sama etno havas certajn sekvojn por la evoluo de la koncernataj homoj, tiu etna komuneco tute ne signifas ke temus pri eterne fiksita stato por tiuj sametnanoj. Etnoj ŝanĝiĝas, disfalas, fandiĝas, “naskiĝas”, “mortas” tra la jarcentoj. Jen unu etno organiziĝas en unu ŝtato, jen en pluraj, jen diversaj etnoj kune formas unu ŝtaton».

“Difino de Etna Identeco”, Marcel Cortiade.

En 1989 IKEL eldonis etan broŝuron verkitan de *Marcel Courthiade/Cortiade* (4), pri “**Difino de Etna identeco**”. Li rememorigas, ke latine oni distingis la homgrupojn laŭ tri niveloj: *gens*, *natio*, *civitas*. Pri la uzado en Esperanto li diras, ke ekzistus taŭga vorto -gento-. Tamen jam en la Fundamento ĝi havis neklaran difinon ĉar en la kvin traduklingvoj ĝi havas alian signifon kaj plie ĝi gajnis specifan signifon por la biblia uzo. Pri la vorto -nacio- li diras, ke la unua ekspliko de PIV respondas sufiĉe bone al -etno- (5) sed en la pliaj difinoj ĝi montras evoluon same konfuzigan, kiel en la etno- aŭ ŝtatlingvoj, miksante ĝin kun la nocioj de ŝtato, regno ktp. Tial -etno-, kiu ekzakte koincidas kun la unua difino de -nacio- en PIV plej precizas por paroli pri «**homgrupo konscia pri siaj diferencoj kun aliaj homgrupoj laŭ kriterioj, kiuj povas esti teritorio, lingvo, religio kaj aliaj kulturaj tradicioj.**» Al tiuj ĉi kriterioj por difini etnojn, citataj de PIV, *Marcel Cortiade* aldonis: komunan ekonomian sistemon, komunan devenon, deziron de komuna vivo.

“Deklaracio por Etnista Humanismo verkita de Daniele Vitali” (6)

Alia grava referenca teksto por IKEL-membroj estas la **Deklaracio por Etnista Humanismo verkita de Daniele Vitali**, itala lingvisto, kiu estis prezidanto de IKEL post *Uwe Joachim Moritz* kaj antaŭ *Alain Favre*, la nuntempa prezidanto. Ĝi estis akceptita en 1999 dum la Universala Kongreso en Berlino. Tiu ege interesa deklaracio enŝovis la etnistajn ideojn en la problemojn de nia nuna mondo kaj vi konstatos, ke ĝi ne tiom maljuniĝis dum 17 jaroj. Plie vi povos konstati, ke ĝi komplete kontraŭstaras la argumentojn de iuj, kiuj volas klasifiki ĉiujn etnistojn inter malapertaj ekstremdekstruloj kaj naciistoj. Tiu proponita Etnista Humanismo situas sur la sama plano kiel socia justeco, respekto de la naturo kaj forigo de la militoj kaj miksiĝas kun ili. Mi citos kelkajn frazojn el tiu deklaracio:

1. «**La nuna “mond-ordo” estas ekstreme maljusta, ĉar ĝi baziĝas sur ekspluatado de la riĉuloj al la malriĉuloj, de la Nordo al la Sudo, de la homo al la Naturo.**»
3. Ĝi mencias **naciismon**, kiel gravan kaŭzon de militoj riskante malaperigon de pluretna socio, kaj ĝin difinas, kiel «**sanktigon de unu ŝtatintereso kontraŭ ĉiu alia.**»
4. La nuna politika kaj ekonomia sistemo «**kapablas dividi la homojn per la armiloj naciismo kaj konsumismo.**»
5. Por repensi tiun mondordon «**laŭ principoj de individua kaj grupa libereco**» necesas:
6. «**ĝeneraliĝo de la principoj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (1948).**»
7. «**Tamen tiu principo de individua egaleco ne sufiĉas, ĉar la individuo estas parto de pli vasta loka komunumo, komunumo havanta ligon kun la tero, kie ĝi loĝas aŭ kie ĝi kutimas moviĝi. Post la Deklaracio de 1948 ekzistas en la mondo distribuo de la popoloj, kiun nur paca evoluo, sed neniuj militoj, “etna purigo” aŭ alia perforto rajtas ŝanĝi.**»
8. «Por solvi tiujn problemojn, ni bezonas ne nur individuan, sed ankaŭ grupan principon de libereco kaj demokratio, ĉar, kiel agnoskas la unua artikolo de la Kadra Konvencio por la Protekto de Naciaj [=etnaj] Minoritatoj, aprobita de la Konsilio de Eŭropo la 10-an de novembro 1994, “**La protekto de naciaj malplimultoj, kaj de la rajtoj kaj liberecoj de**

individuoj apartenantaj al tiuj malplimultoj, estas integriga parto de la internacia protekto de la homaj rajtoj”. La etnaj rajtoj estas do rajtoj homaj.

9. «Ni alvokas ĉiujn homojn kaj organizaĵojn, laborantajn por kultura, lingva, politika, religia kaj alia libereco al kunlaboro por estigo de **nova humanismo, etnista humanismo kiu konsideros la homajn rajtojn laŭ pli kompleta vidpunkto kaj ne neglektos la bazajn aspektojn de grupa kaj loka identeco.**»

Mi finos tiun ĉi ĉapitron substrekante, ke se la apero de la unua numero de **Etnismo** kiel informilo klare ne neŭtrala povis en 1972 ŝoki iujn esperantistojn.

La nuna evoluo de UEA, kiu ja restas neŭtrala ne aliĝanta al iu politika partio sed engaĝiĝas en la nunaj tutmondaj debatoj kiel la Daŭripovaj Celoj de UNO estas en perfekta akordo kun la celoj de IKEL. Tion deklaris **Stefano Keller** en *Lille* dum la membrokunveno de IKEL.

Aliflanke mi informiĝis pri la nuna evoluo de la Asocio Internacia por la Defendo de la Minacataj Lingvoj (AIDMLK) en kiu membris la fondintoj de IKEL kaj konstatis, ke tiu ĉi asocio plu vivas kaj havas sian sidejon en Kairo. Sed ĝia nuna **ĉefa nomo estas en la franca** (la dua restas en Esperanto) kaj **ĝiaj artikoloj estas en la angla**.

Oni ja povas demandi sin kiel serioze defendi la minoritatajn lingvojn uzante kiel nuran lingvon la plej hegemonia lingvo de nia epoko.

La revuo Etnismo

En la [numero 3](#) de **Etnismo** Uwe Joachim Moritz dankas plurajn subtenantojn de «**Etnismo, tiun ĉi eksperimentan eldonadon**». Kaj samnumere ni legas, ke **Etnismo** estis disdonata senpage kun alvoko al donacoj.

La informilo multe evoluis kaj serioziĝis prenante aspekton de revuo, se oni povas diri, senditan al la membroj de IKEL, kiuj pagis kotizon. Gravaj noti, ke ekde 1972 la revuo regule aperis ĉiujare, eĉ se foje kun nur unu numero dum la jaro. Sur nia retejo (5), prizorgata ĉefe de *Stefano Keller*, vi povas legi ĉiujn numerojn ĝis la numero 80 aperinta en 2007. Sed vi ankaŭ povas aĉeti paperajn numerojn, kiam ili ne elĉerpitas.

Ekde 2003 mi reprenis la redaktadon de la revuo. Mi havis iuflanke la ŝancon havi pli modernan komputilon ol la antaŭa redaktisto, kun konekto al Interreto, kio donis la eblecon presigi ĝin ne tro koste en Katalunio kun kovrilpaĝo kolora, kaj la malavantaĝon komenci tiun laboron sen neniuj teknika kono pri enpaĝigo kaj kvazaŭ sen teknika helpo. Mi devas diri, ke mi travivis (kaj foje ankoraŭ travivas) verajn koŝmarajn momentojn provante kompreni la subtilaĵojn de komputiloj. Tamen la tasko interesas min kaj la intereso superis la malfacilaĵojn. Ĉar la organizantoj de tiu kunveno petis min paroli konkrete pri la redaktado de **Etnismo**, mi mallonge ĝin rakontos. Mi ĝin redaktas simple per la enpaĝiga programo *Word*. La unua etapo estas trovi artikolojn kaj al tio nun multe helpas la prezidanto kaj la membroj de la komitato. Ne ĉiuj artikoloj estas verkitaj en bona esperanto kaj ĉiuj, eĉ la bone verkitaj, estas kontrolitaj unue de *Istvan Ertl*, tre kompetenta uzanto de nia lingvo, kaj nun ankaŭ helpas la senkompata rigardo de *Nancy Fontannaz* por provi malaperigi ĉiujn tajperarojn, kiuj bedaŭrinde poluas, se oni povas diri, plurajn antaŭajn numerojn.

Kio aparte plaĉas al mi en tiu ĉi laboro estas la granda libereco, kiun mi ĝuas kaj la fidon de la aliaj estraranoj. Mia persona emo en la elekto de artikoloj estas, kiam eblas, ricevi altnivelajn artikolojn de fakuloj, kiel ekzemple tiu de Profesoro Kimura Goro Cristoph pri lingva pejzaĝo ĉe la germana landlimo, aŭ multajn aliajn, kiel tiujn de niaj estraranoj aŭ de nia honora prezidanto ekzemple. Sed mi ankaŭ ŝatas foje instigi homojn, kiuj ne kutimas verki sed bone konas apartan temon, esprimiĝi. Tio igas min foje reverki artikolojn antaŭ la reviziado, sed kial ne? Ne ĉiuj artikoloj venas kun bildoj kaj oni ne povas imagi la foje plurtagan pripensadon pri taŭga ilustrado. Feliĉe Vikimedio, kiu disponigas amason da bildoj sen postuli aŭtorrajtojn, estas granda helpo. Ankaŭ por trovi mapojn. Ĉar por etnistaj temoj preskaŭ ĉiam necesas mapo kaj mi absolute deziras, ke la mapoj havu esperantigitajn

nomojn kiam ili ekzistas. Nun mi simpligis la laboron gluante la esperantigitajn nomojn sur aliajn. Vi ne povas imagi ankaŭ kiom da horoj necesas por ke paĝo aperu stabila kaj ekvilibra, afero de milimetro, kiu ankaŭ povas daŭri horojn aŭ foje tagojn.

Kompreneble la abonantoj ne multas, la eldonkvanto de la gazeto proksimas al 150 kaj la kotizoj ne kovras la presajn elspezojn. Same kiel en la epoko de *Uwe Moritz* ni bezonas donacojn por subteni nian agadon.

Konkludo: IKEL nun kaj estonte

Ni certe ne laboras same kiel en la tempo de *Uwe Joachim Moritz*. Tio ne venas de konscia strategia elekto sed de laborfortoj kaj de personeco. Nun la revuo estas la ĉefa aktivado apud la daŭra organizo, kiam eblas, de fakkunvenoj dum Universalaj Kongresoj, sed ĝi ŝajnas sukcesa, laŭ la eĥoj. En la tempo de *U. J. Moritz* oni pli multe intervenis ĉe la registaroj, kiuj ne respektis la rajtojn de siaj minoritatoj. Estus bone daŭrigi tiun agadon sed ĝi postulas seriozan pripenson por esti certa, ke iu kaŭzo vere indas je subteno, kiel rimarkis *Alain Favre* en sia eldonista letero de la numero 91.

Nun nova retejo www.etnismo.org funkcias dank'al la instigo kaj helpo de *Stefano Keller* kaj al la donaco de membroj. Tiu retejo, se ĝi estus bone prizorgata kun informoj en ĉiuj lingvoj, kies standardo troviĝas en ĝi, povus esti pli malfermita al ne esperantistoj, ekzemple. Kaj ni baldaŭ devos lasi nian lokon al junuloj, necesas ilin allogi.

Notoj:

(1) *La Internacia Esperanto-Kongreso okazinta en 1972 en Antverpeno ĝuis eksterordinara sukceso. Fakte la titolo kovris 3 eventojn: la 54-an Belgan Kongreson, la 10an Markolan Kongreson kaj la Trilandan Renkontiĝon, kiu escepte okazis ekster la kutima triangulo Maastricht, Aachen, Liège. Vd Vikipedio **La Verda Stelo (Antverpeno)**.*

(2) ***Association Internationale pour la défense des Langues et Culture Menacées (A.I.L.C.M.)*** c/o Lia Romontscha Obere Plessurstrasse 47, CH-7000 Chur.

(3) *Laŭ Duden: esenco, karakterizaĵo per kiuj popolo sin esprimas en sia vivo. Vikipedio franclingva tradukas laŭvorte per "ethnité/ethnicité".*


(4) *Marcel Cortiade estas okcitana lingvisto, kiu fakiĝis pri romaoj kaj multe verkis pri ili. Li suskribis tiun broŝuron okcitanigante sian familian nomon de Courthiade al Cortiade.*

«Pri Difino de Etna Identeco», Marcel Cortiade. Eld. IKEL 1989.

(5) *«Popolo akirinta konscion pri si-mem kiel aparta socia komunumo pro komunaj karakterezaĵoj rezultantaj de historiaj procezoj,»*

(6) <http://www.etnismo.org/eo/ethum.html>

(7) www.etnismo.org





© KULTURAJ KAJEROJ
de la Asocio Amikoj de CDELI
Januaro 2017



www.cdeli.org/kulturaj-kajeroj